

# Flandra ESPERANTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelĝks Vertegenwoordiger in Nederland:  
Achtthende jaargang L E E N  
Nummer 2 (200) sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
FEBRUARI 1951 postrek. 34563 van P. M. Mabeoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDJEDDEN:  
\* Leden: 75 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:  
België: 60 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## LA GRAVA PROBLEMO

En „Heroldo” (n-ro 17) prof. Lapenna prave kritikis la kunvenojn de multaj Esperanto-grupoj, ĉar la programoj, se ili entute ekzistas, estas ofte tiel neinteresaj kaj sensignifaj, ke estas vere heroo ago, elteni ĝis la fino. Kelkfoje oni nur trinkas teon kaj babilas ... en nacia lingvo.

Ofte aŭdata plendo estas, ke rezulte de tio la plimulto restas eterne balbutanta ĉar mankas al ĝi la okazo paroli Esperanton. Sed, dirante tion, la plendantoj inversigas la sinsekvon „kaŭzo-efiko”, ĉar ĝuste la lingva nivelo de la plimulto malfavore influas la programojn!

Amanto de bestoj fariĝas membro de asocio de bestprotektantoj kaj ĉiujare pagas iom da mono. Estas facile, ne plu trinki alkoholaĵojn kaj aliĝi al asocio de abstinenculoj, pagante la ŝuldatan kotizon, sed fariĝi esperantisto postulas pli ol nur monajn oferojn. Tio krome postulas tempon kaj energion sufiĉan por studi la lingvon kaj bedaŭrinde al multaj personoj mankas tiu energio. Ĉiujare nia movado altiras multajn personojn, simpatiantajn al Esperanto, kiuj pretas oferi sian monon kaj iom da tempo por enkapigi la elementojn de la gramatiko, sed restos eternaj komencantoj, ĉar mankas al ili la entuziasmo kaj energio por spertigi pri la lingvo.

Tamen ili ofte regule vizitas la kunvenojn, eble kredante, ke ili lernos Esperanton nur per aŭskultado (kaj dormado). Por komplezi ilin, la sekciaj estraroj adaptas la programojn al iliaj deziroj kaj pro tio dum la konversaciaj vesperoj oni ofte ĉiam denove balbute tradukas frazojn el elementa lernolibro. Sed tia „studado” nur tudas la spertajn esperantistojn; fortimigas ilin kaj neniel plialtigas la lingvan nivelon de tiuj, kiuj neniam flue parolos. Komprenoble oni devas dediĉi iom da tempo al studado, kaj kursoj estas absolute necesaj, sed ili ne daŭru eterne! Komencantoj, kiuj vere volas lerni Esperanton kaj posedas la bezonatan energion, jam post duonjaro pli-malpli flue parolos, ĉar ili multe legas kaj kaptas ĉiun okazon por paroli Esperanton.

La sekciaj estraroj do ne tro multe cedu, sed kiel eble plej bone utiligu la nur tre malmultajn horojn, dum kiuj la anoj povas praktiki Esperanton. La plimulto ja ekster la kunvenoj ne havas la okazon uzi la lingvon! La programoj fariĝu tiaj, ke ni ne plu hontu invitanteeksterulon al ĉeesto de kunveno kaj ne plu timu kompromiti nin mem kaj ... Esperanton.

Denove: for la diletantismon!

## REDAKCIA SOLIGO

Manuskriptoj por la marta numero atingu la redaktoran plej malfrue la 13-an de februaro.

## AKTOROJ KAJ ESPERANTO

En 1896 okazis por la unua fojo teatra prezentado en nia lingvo. Esperantistoj-amatoroj surscenigis en Smolensk komedion, kaj de tiam oni regule prezentis teatraĵojn en Esperanto, precipe dum naciaj kongresoj, sed ankaŭ dum internaciaj, kaj ankaŭ luditaj de profesiuloj.

Dufoje la aliĝintoj al internacia kongreso havis la plezuron admirati klasikajn teatraĵojn, tradukitajn de nia Majstro. Li mem ĉeestis kun la edzino la faman prezentadon de „Ifigenio” de Goethe, kiun li speciale tradukis por la Dresena kongreso en 1908. „Tie ĉi kiel en Hamleto, du geniuloj renkontiĝis.” Carlo Bourlet fervore tamburis por ĝi en „La Revuo”, kaj li eĉ antaŭe vizitis la ege talentan berlinan aktoron Reicher, la renovigintan de la germana teatro, kiu „diligente lernas la lingvon... kaj kiu opinias (ke Esperanto) estas vere mirige bela kaj harmonia; mi estas certa, ke el ĝi oni povos tiri plej impresajn teatrajn efektojn.” La entuziasma Reicher ja multe propagandis ĉi plej eminentaj rondoj kaj revis pri kelkaj kromaj prezentadoj en Aachen, Paris, k.t.p.; li revis pri fondo de internacia teatro, „kies publiko estos la Mondo”; parolis pri tio per flamaj vortoj... „Sub la sankta signo de l'espero, idealistoj ne ĉesas kontraŭbatali la krude realismajn faktojn...”

Reicher (Toas) grupigis ĉirkaŭ si la plej bonajn aktorojn de la tempo: Bruno Deroli (Oresto); Kurt Stark (Pilado); Oscar Fuohs (Arkas) kaj sian filinon Hedwig (Ifigenio), kiu tiucele venkis aron da malfacilaĵoj por liberiĝi de sia Nov-Jorka kontrakto. Reicher mem decidis porti la financon riskon, nur se la organiza komitato donos al li la certecon, ke li estos la sola profesia aktoro, kies entrepreno estos oficiale subtenata. La prezentado estis granda sukceso, kvankam almenaŭ 300 kongresanoj ne ĉeestis... ĉar la prezentado ne estis senpaga! „Ili pentu, ili ŝiru siajn harojn!” kriis Bourlet. Kvar, kvin vicoj de seĝoj (je 20 markoj) restis neokupitaj, sed lastmomente la nekondifintoj premiĝis supre en la paradizo, sur la malkaraj starlokoj. „Ne unu spiron, la koroj batas!” kaj je la fino la entuziasma aŭdantaro revokas la aktorojn ses, sep fojojn kaj lastfoje Reicher, paŝante sur la antaŭscenon krias: „Karaj samideanoj, ĝis la revido!” Kaj d-ro Zamenhof? En posta numero de „La Revuo” troviĝas du tradukoj de li el Heine, dediĉitaj „Al fraŭlino Hedwig Reicher”.

Sia figuro? Franco, nome Carlo Bourlet, ĝin priskribas: kun siaj nigraj okuloj, siaj korvenigraj haroj enkadrigitaj stilpuran vizagon, sia alta eleganta staturo, ŝi prezentas la ravantan klasikan tipon de la Grekino... En la blanka „peplum” ondiganta ĉirkaŭ ŝia fleksebla korpo, ŝi aliras al la altaro... Dudek jarojn poste estis la vico al „Hamleto”, okaze de la internacia kongreso en Antwerpen (1928) Laŭ la organo de U.E.A., la prezentado (dufoja) estis almenaŭ same bela kiel la plej gloraj, kiujn la kongresanoj jam ĉeestis. „Tiu unua ludado de Hamleto en Esperanto, vere estas la apoteozo de la kongreso kaj restos epokfaranta en la historio de la lingvo.” La geaktoroj, diris „Pola Esperantisto”, modele elparolis nian lingvon. Kia diferenco estas inter tiu prezentado kaj la prezentado de „Genevra” (Privat) en Genevo okaze de la 17-a, kiam la teruraj „zed, zinjoro”, k.t.p. tranĉis ĉiujn eĉ ne tro fundamentajn orelojn. „Samideano Pragan diligente... sufloris!”

Grava estis la sukceso por la flandraj geaktoroj Willem Cauwenberg (Hamleto), iama sekretario de antverpena Esperanto-grupo; Gaston van der Meulen (Horacio); Corry Lievens (Otelio), kiuj ankoraŭ ĝuas la favoron de la publiko, sed la daŭra efektiva Esperantisto de la tuta grupo estis Jef De Waegenaere (Klaudio), kiu

antaŭ kelkaj monatoj forpasis en la aĝo de 84 jaroj. En 1914 li jam estis ludinta Jean Baptist en „Bietje” de Maurits Sabbe, en nacia kongreso en Mechelen; Van de Velde estis Monne kaj Marguerite Bertrijn ludis la titolrolon, kiun ŝi kreis en la nederlanda. Sia patro Louis Bertrijn, estinta direktoro de la antverpena teatro, antaŭis sian kolegon De Waegenaere nur je kelkaj tagoj en la landon, kie ni ĉiuj ludos nian eternan senkarnan rolon... En antaŭa internacia kongreso en Antwerpen (1911) oni prezentis „Kaatje” de Paul Spaak (pensu al nia nacia, unulingva universala Paul Henri Spaak!) ankaŭ tradukitan el la franca de Willem Kloos, kaj en kiu Louis Bertrijn ludis la rolon de Jan; lia edzino Hélène, tiun de Kaatje; Marie Verstraete tiun de „la patrino”; Karel van Rijn tiun de „la patro” kaj en kiu Magda Janssens estis Pomona. Ĉiuj iam brilaj nomoj! Alia fama flandra aktoro Piet Janssens same simpatiis al Esperanto kaj mi memoras vespereston de la diamantista grupo de s-ano Swalf, post la unua milito, en kiu li deklamis per sia grava, belsona voĉo, „la du grenadistoj” de Heine, en la traduko de Zanoni (Pillath).

Vere, kiam la Esperantistoj sukcesas krei vigan vivon en siaj rondoj, la profesiaj aktoroj ne restas indiferentaj, male estas instinkte allogataj de la internacia lingvo, kiu donas ceo-blan eĥon al ilia arto.

Trafis min tiurilate pasintan s-ano en Arnhem, ke s-ino Koster-Van Ghelder montriĝis klareprimaj kaj entuziasma Esperantistino, vekanta artan ĝuon pro sia vigla, nuancita deklamado, okaze de la someraj kursoj.

En 1926 tuta Nederlando kantis:

„Ho Rozinjo, ho Rozinjo,  
Al vi pensas mia kor’  
Ĉar vi estas la trezor’  
Kiu restas en memor’!”

La heroino de tiu populara kanteto estis s-ino Köhler mem, kiu triumfis kiel ĉefaktorino en konata revu-entrepreno „ter Hall”, de kiu ŝia edzo estis la direktoro. Kiel 15-jarulino ŝi debutis en Flandrujo — en Gent — en la flandra teatro, post akiro per „Salome” de la 1-a premio en la tiea konservatorio, pro kio la najbararo florumis la patran domon kaj organizis serenadon. Ekde 1912 ŝi vivas en Nederlando, kie ŝi rimarkigis sin per sia natura kaj temperamenta ludo. Fama kritikisto atestis pri ŝi: „tiam envenis Rozinjo van Ghelder kaj estis kvazaŭ fenestroj kaj pordoj kontraŭe malfermiĝis kaj freŝa tibrilovo traventis la scenejon”. Sed, ve, la enigma sorto volis, ke tiu inteligenta aktorino, ĉiam aspiranta al pli altnivela artmanifestado, malofte havis la okazon montri sian veran talenton sur tiu kampo. „Ĝis mi estos tro aĝa — ne, ĝis mia morto,” emocie skribas s-ino Köhler, mi restos idealistino kaj aspiros al la realigo de mia revuo.”

Ĉu Esperanto, kiu estas por ni la feino de niaj revoj, finfine ne havos la privilegion krome efektiviĝi tiun de nia samideanino?

TYNEVERUM.

## DIFINOJ

Amo eterna: periodo proks. sesmonata  
Aristoj: postmortaj vengiloj de la fiŝoj  
Blindeco: ĝedra delikateco  
Casteco: malvirto kontraŭnatura  
Sekreto: oni ĝin rakontas ne al pli ol unu persono samtempe  
Soforo: la plej danĝera parto de la aŭtomobilo  
Uzuristo: bankisto kiu troigas  
(El „S.A.T.-Amiharo”)  
Platona amo: la tempospaco inter la unua renkonto kaj la unua kiso  
Pluvombrelo: duŝo por du personoj  
Oportunisto: ulo kiu faris kion vi intencis fari.  
(El „Readers Digest” trad. Hedero)

## PRELEGOJ DE PROF. I. LAPENNA

Sendube ĉiu el vi jam aŭdis aŭ legis pri d-ro Ivo Lapenna, universitata profesoro pri internacia publika juro, kiu faris sukcesplajn prelegvojaĝojn tra Islando, Anglujo kaj Francujo. Sufiĉe ofte ja aperis artikoloj liaj aŭ raportoj pri liaj prelegoj en la internacia Esperanta gazetar. Tiu, kiuj aŭdis lin en Universala Kongreso scias, ke ni ne troigas, nomante lin „la plej fama oratoro en Esperantujo”. Prof. d-ro Lapenna, kiu nuntempe troviĝas en Italujo komence de marto venos ankaŭ al Flandrujo kaj Nederlando, por fari prelegojn, resp. sub aŭspicioj de Fl.L.E. kaj L.E.E.N. Li prelegos pri diversaj landoj kaj popoloj de Eŭropo, i.a. pri Islando, la lando de fajro kaj glacio, la nuntempa Britujo, Jugoslavujo lando, popolo, historio kaj kulturo, München, la urbo de la ĉi-jara U.E.A.-kongreso kaj krome laŭ elekto de la invitontaj sekcioj pri la Esperantomovado, ekz. pri la nuna stato kaj perspektivoj de Esperanto. Por pli larĝa publiko, mezlernejanoj, studentoj kaj ne-esp.-istaj, unuigoj li pritraktos la problemon de internacia lingvo kaj en universitataj rondoj antaŭ studentoj kaj fakuloj li prelegos laŭ elekto en franca, itala aŭ germana lingvo pri diversaj aspektoj de la internacia juro, i.a. pri la Unuigintaj Nacioj, solvado de internaciaj konfliktoj, jurisdikcio kaj kompetenteco de la Internacia Kortumo, la Universala Deklaro pri la Homaj Rajtoj, k.t.p.

Prof. Lapenna tamen venas ne nur por fari prelegojn, sed krome por kontakti kun la landaj kaj lokaj gvidantoj de nia movado, por diskonigi Esperanton al larĝa publiko kaj speciale al intelektulaj rondoj kaj por stimuli la esperantistaron.

Sendube neniu el la fortaj sekcioj preterlasos inviti prof. Lapenna kaj komprenoble ĉiujn niajn flandraj kaj nederlandaj samideanoj kaptos ĉi tiun unikan okazon ĉeesti iun el liaj prelegoj.

## B.I.G.S. kaj Esperanto.

La Brasilia Instituto de Geografio kaj Statistiko (B.I.G.S.) kiu metis Esperanton en la instruprogramon por siaj oficistoj; akceptis tiun lingvon kiel helplingvon en siaj publikigaĵoj kaj jam aperigis valorajn librojn en Esperanto, i.a. beleaspektajn gvidlibrojn pri la urboj Salvador kaj Sao Paulo, denove sendis al ni tri belajn verkojn, kiuj atestas pri ĝia aktiveco sur ĉi tiu tereno, nome belan gvidlibron pri Belo Horizonte, la ĉefurbo de ŝtato Minas Gerais, kiu konigas al ni pere de belaj fotoj tiun urbon, „Nova erao, la erao de la tutmondécio kaj Esperanto”, paroladon, faritan de d-ro M. A. Teixeira de Freitas, prezidanto de la Brasilia Societo de Statistiko, kaj „Por iu pli bona mondo”, kolekton da dokumentoj, dediĉitan de B.I.G.S. al la XXII-a Int. Kongreso de Katolikaj Esperantistoj 1950. Ni gratulas la Brazilan Esperanto-Ligon kaj B.I.G.S. pro ĉi tiuj valoraj eldonoj kaj forte esperas, ke la iniciato farita en Brazilo, trovos imiton en aliaj landoj kaj iom post iom kondukos al ĝenerala oficialigo de Esperanto.

**NEDERLANDAJ POETOJ EN TRADUKO**

**INFANOPENSOJ (KINDERGEDACHTEN)**

*'Adama van Scheltema*

*Ho pluvas — pluvas plu kaj pli!  
Ĝin aŭdas en ŝi' varma mi.  
Mi aŭdas pluvkantadon, —  
Pluvpluvas ege, ja sen fin' —  
Ke nun nentiu vidas ĝin,  
Ĉi ĉian malheladon!*

*Murmuras, pluvas, sprucas — dum  
Malsekaj igitaj arboj nun,  
Fosaĵoj pliaŭde bruas.  
Pluvpluvas ĉie, tiel ke  
El defluloj nun, ho he,  
Tutcerte fadenfluas.*

*Jen stranga kaj komika bru!  
De el malluma lita tru'  
Ĝin aŭdi plezurgustas: —  
Sajnestas pluvinterparol',  
Aŭ ĉu knabego kun petol'  
Ĝin en orelojn flustras.*

*Al herbo gutas kaj al bed' —  
Ĝetigos granda nun marĉet'  
Sur ĉiu voj' malglata —  
Nentiu nun en plenaer' —  
Imagu nur en ĉi veter' —!  
Prisonĝo estus ŝata.*

*Kaj frue, morgaŭ en sunklar',  
Ĝiam argenta foliar'  
Ĝetos gutetperlit' —  
Mi agos ja laŭ mia plac'.  
Mi kuros — foren el vilaĝ' —  
En mondo belgita!*

trad. H. Vermuyten

**VARBU DONACANTOJN PER „DE ESPERANTIST“**

La propagando por Esperanto kostas multe da mono; pli ol la ofte neriĉaj esperantistoj povas disponigi por tiu celo. Kelkfoje la sekciaj kasoj estas malplenaj kaj ni do bezonas monajn oferojn ankaŭ de ne-esperantistoj.

Kutime neniu ŝatas donaci ion por celo, pri kiu li ne estas informita. Se ni do deziras varbi donacantojn, ni informu la varbotojn pri nia movado kaj plej bone oni povas tion fari, sendante al ili „De Esperantist“. Tiu gazeto, redaktita en la nederlanda lingvo enhavas multajn sciindaĵojn pri nia movado, regule mencias novajn venkojn, k.t.p. La legantoj ekinteresiĝos kaj facile estos varbeblaj. Sed se ili, paginte sian kotizon, dum tuta jaro aŭdas kaj legas nenion pri nia movado, la kasisto duafoje vane frapas sur ilian pordon. Pro tio la donacantoj de L.E.E.N. ĉiuj ricevas senpagan jarabonon, se la kasisto ĝustatempe pagis ilian kotizon (g. 0,50 en jaro) per ĝirkonto 34563 de L.E.E.N. kaj sciigas la adresojn al la adm. s-ro E. A. Burk, Westduinstraat 58 I, Amsterdam-W.

La flandraj amikoj ricevos ĉiujn numerojn aperantajn en 1951, se ili pagas la modestan kotizon (b. fr. 20,—) per poŝtekkonto 232150 de V.E.B., Brussel.

La marta numero, enhavas i.a. interesajn artikolojn pri „Esperanto kaj Scienco“ kaj estos efika propagandilo speciale en intelektulaj rondoj. Ĉiu aktivulo, kiu deziras propagandi, mendu kelkajn ekstrajn numerojn por disdono al interesigantoj aŭ forvendo en kunvenoj, k.t.p.

Ĉu vi scias, ke la oficejo „Esperanto de la Instruado“ regule dissendas 800 ekz. senpage al la parlamentanoj, al instruataŭtoritatoj kaj lernejoj?

Pluraj sekcioj regule sendas „De Esperantist“ al publikaj legejoj, diversaj institucioj kaj aŭtoritatoj. Imitu ilian ekzemplon kaj faru propagandon, kiu ne postulas tempon kaj nur malmulte da mono (tutjara abonon kostas nur g. 0,40!), sed tamen ne restos senefika. Vi ja scias: „eĉ guto malgranda, konstante frapante...“

**T.J.O.-KUNVENO**

T.J.O. okazigos sian ĉiujaran internacian kunvenon en 1951 en Haarlem.

La programo mencias i.a. labor-kunsidojn, diskutojn, festvesperon, sportkonkursojn, filmprezentadon kaj ekskursojn al Amsterdam, Zandvoort, Alkmaar, Schoorl, Bergen, Edam (kie okazos festvespero), Monnikendam, Volendam kaj Marken.

Kostoj por ĝejnuloj ĝis 19-jaraj g. 30,—; por pliaĝuloj ĝis 31-jaraj g. 35,— kaj por pli aĝaj personoj g. 40,—.

Informojn donas s-ro C. Geurts, M. Tinxgracht 10, Edam.

**LA STUDANTO**

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

Skoto, kiu suferis pro kormalsano, foje vojaĝis per (kun) la vagonaro al granda urbo, por konsulti en tiu urbo korskonsultiston, pri kies famo li antaŭ kelkaj tagoj legis longan artikolon en la ĵurnalo. Li dum la tuta vojaĝo konstante rigardis tra la fenestro al la kampoj, preter kiuj la vagonaro veturis kaj sur kiuj paŝtis sin multaj bovinoj. Forlasinte post la konsulto la domon de la kuracisto, li iris tra pluraj stratoj kaj trans kelkajn pontojn kaj fine post promenado de duona horo ree atingis la stacidomon. Estis la kvara horo, do li devis atendi ankoraŭ dum kvaronhoro. Precize je kvarono post la kvara la vagonaro, per (kun) kiu li intencis vojaĝi hejmen, alvenis kaj li trovis lokon en kupeo, en kiu jam sidis kelke da pasaĝeroj. Ĉiun fojon, kiam la vagonaro haltis ĉe haltejo, la skoto iris el la kupeo, kuregis al la stacidomo (en la stacidomo) kaj post tio fulmrapide revenis en la kupeon. Ĉi tio okazis jam dek fojojn. Fine iu el la scivolaj viroj, kiu sidis apud li sur la sama benko kaj preskaŭ krevis pro miro pri lia stranga konduto, demandis lin: „Sinjoro, kial vi ĉiufoje rapidas al la stacidomoj (en la stacidomojn)?“ La skoto respondis: „Ĉar laŭ mia kuracisto mia sanstato estas tiel malbona, ke mi povas morti ĉiumomente, mi aĉetas ĉiufoje nur bileton ĝis (al) la proksima haltejo. Se mi estus aĉetinta bileton por la tuta vojaĝo, mi eble estus elspezinta tro multe da mono tuj antaŭ mia morto!“

teisteren — bezienswaardigheden — fundamenteel — catastrophaal — notedop — niet te onderschatten — toespijs — te koop — zeeengte — vruchtbaar — schaaqbord — wandelaar — een appel schillen — oneetbaar — geraamte — bloeditstorting — snoepgoed — manen (v. paard) — schoondochter — misstap — misdadiger — vondeling — zwager — in vervulling gaan — weefgetouw — arendsjong — laakbaar — sterfelijk — spozucht — schandelijk — omkopen — koortswerend — verhuizen — landmeter — bovenmatig — rijpen — openbaar maken — schateren — strijdbaar — lezerskring — architectonisch.

Vertaal:

1. Nadat hij afscheid van ons genomen had, verliet hij Brussel, de hoofdstad van België, en vertrok naar Amsterdam, waar hij een deel van zijn vakantie door zou brengen.  
2. De winkelier zei me, dat de lepels, die ik uitgezocht had, tien gulden per dozijn kostten. Omdat ik die prijs te hoog vond, vroeg ik hem, of hij geen goedkopere lepels had.  
3. Bent U al eens in Hilversum geweest? Neen, maar ter gelegenheid van het congres van F.L.E. en L.E.E.N. hoop ik die stad met haar vele bezienswaardigheden te bezoeken.

Tracht voor de volgende uitdrukkingen een passend Nederlands equivalent te vinden:

ventkapulo — vi ĝuste trafas! — mankas klapo en lia kapo — scii laŭfame — kontraŭdiraj sciigoj —

**KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.**

	Gld.	Belg. Fr.
Vortoj kaj esprimoj de C. Zondervan	1,15	15,50
Esperanta Krestomatio (preskaŭ eĉerpita)	1,50	24,—
Rembrandt, la magiŝto	5,—	68,—
Kudlago, la ĵuna eskimo	0,70	—
Plena vortaro	11,50	175,—
Tra la labirinto de la gramatiko	5,90	85,—
La natveco de pastro Brown	3,25	—
La lanternisto (trad. Kabe)	2,50	34,—
La vojoj estas nekonataj	2,50	34,—
La nevenkebla ĝeno	4,90	67,—
Ĝury kaj Sulo	0,25	4,—
Kiso de la reĝino (nova „Epoko“-eldonaĵo)	2,35	—
Miru-Pensu-Ridu de P. Bennemann	4,80	65,—
Kredu min, sinjorino de C. Rossetti	4,80	65,—

Ĉu la flandraj esperantistoj jam posedas verkojn de propraj aŭtoroj? Se ne, ili mendu:

Pallister de F. Timmermans (broŝ.) 25,—  
Elektitaj noveloj de L. Baekelmans 12,—  
Kristnaska triptiko de F. Timmermans 9,—  
Se aŭskultas la animo, poemaro de G. Gezelle (majstre trad. de H. Vermuyten) 15,—

Ĉu vi ŝatas legi detektiv-romanojn? Se jes, nepre mendu:

Blua sango 20,—  
Irisia 20,—  
La Morea perlo 20,—  
Sub la vitra kupolo 20,—  
La radianta lotuso 25,—

**MENDU ĈE**

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (ĝiro 76915)  
Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3868.51)

Li estas la korpiginta (personiginta) boneco — preskaŭ neniam — aĉeti partopage — vi parolas facile! — tranokti sub la libera ĉielo — senprokraste maldungi iun — kvadrata ŝtofo — malobservi (malobei) la leĝon — sensacia komuniko — paganta gasto — fraŭdevit imposton — sulkigi la frunton — alude — aljuĝi al iu premion — mia kapo turniĝas — intermita febro — (obstine) persisti — venki la malfacilaĵojn — rezigni pri siaj klopodoj — juĝi laŭ onidiroj — ĝis eterneco — distrumpeti ion.

Du hispanoj malpaciis inter si kaj decidis figni tion per duelo. Por ne (al)tiri tro multe da atento, ili interkonsentis okazigi la duelon en malgranda provinca vilaĝo. Frumatene ili kune forveturis vagonare. La unua aĉetis iran-, la dua iroveenan bileton. „He,“ diris la viro kun la (iro) revenbileto, „ŝajne vi ne multe fidis al la rezulto, aĉetante (ĉar vi aĉetas) nur iran bileton. Ĉiufoje kiam mi devas dueli, mi aĉetas iroveenan bileton.“ „Ne mi,“ diris la alia, „mi ĉiufoje aĉetas iran bileton kaj revojaĝonte mi prenas la revenbileton de la alia.“

Por la komencantoj ni ĉi foje donas ekzercon pri vortfarado. Traduku, ne uzante vortaron: broederschap — arrestant — vuilnis — onwelriekend — stadgenoot —

paradi per la meritoj de aliulo — esti tre ofendigema — plengorge kanti — la penso fulmis tra mia kapo — esti elmetita al danĝeroj — vole blinda — kio fariĝos el tio? — tagon post tago — ĉiun duan tagon — satira poemo — vi pentos pri tio! — mokserci iun — sin regali per io — malmolkora — kontraŭdiraj sciigoj — ne ekzistas alia rimedo — li kredas sin personiginta saĝeco — ĝui bonan reputacion — abrupte rifuzi — sencaligi ies vortojn — unukolora ŝtofo — reciproki ies amon — perdi ies favoron — ĉiu birdo kantas laŭ sia beko — esti tute senparenca — la dorsa flanko de la medalo.

Laŭ peto de iu el la studentoj, ni ĉi sube mencias la plej ofte uzatajn mallongigojn:

anot.: anstataŭ  
ĉ.: ĉirkaŭ  
del.: delegito  
d.e.: devas esti  
d-ro: doktoro  
ekz.: ekzemple  
Esp-o: Esperanto  
f-ino: fratino  
i.a.: inter aliaj  
k.a.: kaj aliaj  
k-do: kamarado  
kas.: kasisto  
n-ro: numero  
pg. (p.): pago  
prez.: prezidanto  
prof.: profesoro  
rim.: rimarko  
sekr.: sekretario  
s-ro: sinjoro  
s-ino: sinjorino  
t.e.: tio estas  
t.n.: tiel nomata  
vol.: volumo  
Z.: Zamenhof  
k.t.p.: kaj tiel plu  
P.V.: Plena Vortaro

**VERDLANDO VOKAS**

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

**Dimanĉe:**  
17.00—17.20 Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.

**Lunde:**  
6.30—6.35 Vieno, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m, 513 m: I.  
8.15—8.30 Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I  
8.45—9.00 Rijaŝel (Lille), 235 m: P.  
15.30—16.— Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.

16.15—16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I  
23.15—23.20 Hilversum I, 402 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne: 5-II-51, ktp).

**Marde:**  
2.15—2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I  
12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur  
18.40—18.45 Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

**Merkrede:**  
0.45—1.00 Gvatemalo, 49 m: I.

**Ĵaŭde:**  
9.30—9.45 Parizo, 48,39 m, 347 m: K.  
12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.  
18.10—18.25 Vieno, 25 m, 30 m, 41 m, 48 m, 203 m: P. (ĉiun duan ĵaŭdon).

18.40—18.45 Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza disaŭdigo.

**Vendrede:**  
17.00—17.20 Romo, 19,5 m, 31,1 m: I kaj M.  
18.15—18.30 Hilversum II, NCRV, 298 m: P. (Nur unufoje en du monatoj).

**Sabate:**  
20.00—20.15 Sofio, 39,11 m: I kaj P.  
23.15—23.20 Hilversum II, KRO, 298 m: I.

J.A.R.O. (Jeugd Amateurs Radio Omroep) komisie de UNESCO pretigis tekston en angla lingvo kaj Esperanto, kiu post aprobo de la koncerna instanco estos disaŭdigata pere de la sendstacio de UNESCO.

**Informoj kaj petoj:**  
Nun ankaŭ „De Radiobode“ (A.V.R.O.) tre okulfrape presigas niajn informojn pri la Esperanto-dissendo. Bonvolu danki la redakcion kaj afable inatigi la redakciojn de „Omroepgis“ (N.C.R.V.) kaj „Vrije Geluiden“ (V.P.R.O.), kiuj ĝis nun ne akceptis la proponon de Radio-Servo N.C.K.E.

Dankante pro la belaj kartoj kaj bondeziroj okaze de la jarŝanĝigo mi deziras al ĉiuj feliĉon, prosperon kaj agrablan aŭskultadon!

Informojn pri Esperanto-radio-sendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkuwerd (Fr.), Nederlando.

Afdelingsbesturen en actieve Leden!

Gebruikt voor Uw propaganda

„De Esperantist“

Abonnement fl. 0.40 p. j.

Vertaal:

Prezentante pure kondiĉan rimedon de reciproka komunikigado, la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene egale; kaj por ke ĉiuj povu uzi la lingvon egale, estas necese, ke ekzistu iaj modeloj, gvidaj por ĉiuj.

Een gevangene had kans gezien te ontsnappen. Gelukkig waren er bij zijn binnenkomst in de gevangenis zes verschillende foto's van hem gemaakt, zodat men in de gelegenheid was alle politiebureaux van voldoende herkenningmateriaal te voorzien. Na enkele dagen kwam er uit een klein dorp een telegram van de plaatselijke veldwachter: „Heb vijf van de zes ontsnapten gearresteerd. De zesde volgt vermoedelijk morgen.“  
el: „Ponto al la Praktiko“.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Februari aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:  
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.  
 Penningm.: P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.  
 Boekendienat, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 78915.  
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuwater. 29, Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

**KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO**

Prof. d-ro Ivo Lapenna ĉeestas la ĉefestrarkunvenon de L.E.E.N. 3-4 III en Amsterdam kaj tuj poste komencos sian prelegovojaĝon, kiu finiĝos je 21-III. La ĉefestraro de L.E.E.N. jam dissendis ĉirkuleron kun tiuj necesaj detaloj. La sekcioj bonvolu rapide ekagi kaj tuj kontakti kun la lokaj sekcioj de la aliaj en N.C.K.E. kunlaborantaj asocioj, resp. kun ne-esp.-istaj unuigoj, por ke prof. Lapenna atingu kiel eble plej larĝan aŭskultaron. Se li parolos antaŭ ne-esp.-istoj, oni kompreneble disponigu al li spertan interpretiston.

Tiuj, kiuj intencas partopreni nian planotan karavanovojaĝon al la internaciaj someraj kursoj, kiuj okazos 22-29 VII en Helsingör (legu la koncernan sciigon en la antaŭa numero) bonvolu jam nun provizore anonci sin ĉe la ĝen. sekr., por ke ni kiel eble plej baldaŭ povu decidi, ĉu la karavanovojaĝo definitive okazos.

La ĉefestraro intencas okazi en la kadro de la jarkunveno diskuton pri la temo: kiel plibonigi la generalan staton de nia asocio kaj de la sekcioj kaj kiel plifirmigi la kontakton inter la sekcioj.

En la kadro de la jarkunveno je 13-V prelegos s-ro H. Vermuyten el Antwerpen pri literatura temo.

En nia lastjara kongreso en Groningen oni decidis, ke la ĉefestraro esploru la eblojn pri event. aranĝo de Universala Kongreso en Nederlando. Jam tiam ni koncize pritraktis la malfacilaĵojn venkajn por okazigi U.K. en nia lando. La ĉefestraro, detale konsiderinte ĉi tion, provizore ne vidas la eblon, aranĝi U.E.A.-kongreson en Nederlando.

Event. amendoj je la proponoj por la jarkunveno, kiujn ni publikigis en la antaŭa numero, atingu la ĝen. sekr. antaŭ la 1-a de marto.

La sekcioj bonvolu pagi la kotizon por la unua duonjaro 1951 antaŭ la 1-a de marto per poŝtkonto 34563 de la ĝen. kasisto de L.E.E.N. Imitu la donan ekzemplon de sekcioj Leiden kaj Rotterdam (Espero), kiuj jam nun pagis la kotizojn por la tuta jaro 1951!

La ĉefestraroj sincere dankas pro la ricevataj bondeziroj okaze de la jar-sanĝiĝo kaj kompreneble elkore reciprokas ilin!

**ASOCIA JARRAPORTO - LA ESTONTO ESTAS NIA -**

Legante la sekciajn raportojn pri la jaro 1950 oni povus konkludi, ke la pasinta jaro ne estis tre favora por nia movado. Multaj sekcioj plendis pri manko de intereso pri la kursoj flanke de la ne-esperantistoj; pluraj sekcioj eĉ ne klopodis starigi kursojn. Sed vere ne estas mirige, ke en periodo kiam la ekonomiaj sekvoj de la dua mondmilito ankoraŭ ĉie sentiĝas kaj multaj personoj kredas trian baldaŭan militon neevitebla, la homoj ne amase interesiĝas pri Esperanto. Tamen ofte ankaŭ kulpas la esperantistoj mem. Pluraj sekcioj funkciuloj ŝajne tute ne scias pri la ekzisto de par. 2 de nia statuto kaj sen ia konfuziĝo ne respondis demandojn kiel: „ĉu vi faris propagandon?“, „ĉu via sekcio regule kunvenis?“, „Feliĉe kelkaj sekcioj montris laŭdindan aktivecon, aranĝis kunvenojn kun bonaj programoj kaj tiel pruvis al la ekstera mondo, ke Esperanto daŭre konkeras terenon kaj ke nia movado neniel stagnas, sed progresas. Kaj tion ĝi ja faras: oni nur legu la koncernajn komunikojn en la internacia Esp.-gazetaro por konvinkiĝi pri tio. Novaj venkoj regule estas menciataj. Estas vere, ke multaj venkoj estas bagatelaj, sed ne grave: el akveroj ja fariĝas riveroj! Pli kaj pli la redaktoroj de gravaj periodaĵoj konvinkiĝis pri tio, ke ne plu estas eble ignori nian celadon kaj abundis artikoloj, plej ofte favoraj, pri Esperanto. Pluraj radio-stacioj regule elsendas en Esperanto. U.N.O.

serioze atentis nian aferon okaze de la transdono de la internacia pet-skribo. Turismaj instancoj kaj fakaj revuoj ekuzis Esperanton por atingi internacian legataron. Ne nur eksterlande, sed ankaŭ en Nederlando ni faris konsiderindajn progresojn en oficialaj rondoj kaj pluraj aŭtoritataj favoras nian movadon. Pligrandiĝis la nombro da lernejoj, seminarioj, institutoj kaj universitatoj, en kiuj Esperanto estis enkondukata kiel instrufako. Ankaŭ en sciencaj rondoj Esperanto pli kaj pli penetras. En nia lando la oficejo „Esperanto ĉe la Instruado“ daŭre aktivis kaj aranĝis pasintjare specialan kurson por instruistoj. Nij someraj kursoj en Arnhem plene sukcesis, same la kongreso en Groningen. N.C.K.E. revigligis; invitis s-ron Tadoros Megalli prelegi en multaj lokoj kaj presigis 20.000 ekz. de la nova broŝuro „Esperanto, de wereldhulptaal“. La supre aluditaj sekcioj raportoj do neniel sukcesis fari min pesimisma.

Ĉefestraro. Komence de 1950 la ĉefestraro konsistis el la jenaj personoj: s-ro P. W. Baas (Amsterdam), prezidanto, s-ro A. J. Kalma (Amsterdam), sekretario; s-ro P. M. Mabeoone (Amsterdam), kasisto; f-ino H. M. Mulder (Badhoevedorp); s-roj F. Weeke (Den Haag), H. A. Appel (Bergen op Zoom), W. H. Mook (Groningen) kaj C. B. Zondervan (Deventer). Eksiĝis okaze de la jarkunveno s-ro P. W. Baas, kiun anstataŭis s-ro H. J. Blokker (Heemstede) kaj krome eksiĝis f-ino H. M. Mulder, s-ro H. A. Appel kaj s-ro W. H. Mook, kiujn anstataŭis f-ino S. Visser (Hilversum) kaj s-ro W. Böttcher (Leeuwarden). La nombro da ĉefestraranoj do reduktiĝis al 7. Okazis 4 ĉefestrarkunvenoj: 2 en Amsterdam, 1 en Heemstede kaj 1 en Groningen. La anoj de la adm. ĉefestraro regule kunvenis escepte en periodo, kiam s-ro H. J. Blokker pro malsano ne povis ĉeesti. Kun la aliaj ĉefestraranoj ili kontaktis kiel kutime per ĉirkuleraĵoj leteroj.

Sekcioj: Fine de la jaro 1949 ni havis 34 sekciojn, sed mortis sekcioj Dokkum kaj Wageningen, do restis 32. Feliĉe kelkaj membroj de sekcio Dokkum restis ĝen. anoj kaj parto de la likvidiginta sekcio Wageningen estis adoptata de Arnhem. Fine de la jaro mortis sekcio Assen post longa agonio kaj pri sekcio Hengelo ni ne scias, ĉu ĝi ankoraŭ vivas aŭ ne. Cetero ne nur Hengelo, sed ankaŭ Almelo, Bergen op Zoom, Culemborg, Eindhoven, Heerenveen kaj Sneek malgraŭ plurfoja peto ĝis nun ne respondis la demandon kaj ne sendis la novajn membrlistojn. La membrperdo en 1950 estis konsiderinda, sed feliĉe tiu perdo jam parte estis kompensata pro la kresko de kelkaj aktivaj sekcioj. Krome ni en la nova jaro verŝajne sukcesos fondi kelkajn novajn sekciojn. Kiel kutime kelkaj anoj eksiĝis, nepaginte la ŝuldatan kotizon. (daŭrigota)

**Oficejo**

„Esperanto ĉe la Instruado“

**STATISTIKO**

Same kiel antaŭajn jarojn ni dissendis demandlistojn al la de ni konataj geinstruistoj de Esperanto-kursoj en lernejoj. Ni urĝe petas tiujn gelegantojn, ke ili konvinku sin, ke tiu kursguidant(in)o ricevis nian formularon. Oni zorgu, ke ĝi estu resendata kompletigita. Se vi konstatas, ke iu instruisto, kiu bezonas la demandfolion, ĝin ne ricevis, vi bonvolu havigi al ni lian adreson. Guste nun tre gravas, ke nia statistiko estu kompleta kaj fidinda.

**Porinstruista Kurso.**

Kun granda ĝojo ni komunikas, ke denove nia oficejo aranĝos komencan kurson por geinstruistoj kaj geprofesoroj. Ĝi okazos en la konferencujo „Waltrevreden“ en Kerk-Avezaath apud Tiel, de la 30-a de julio ĝis la 11-a de aŭgusto. Kursmono g. 12.—; restado kaj manĝoj senpagaj. Prospekto kun tiuj necesaj informoj aperos, sed interesiĝantoj jam nun petu alsendon.  
 P. W. Baas, direktoro.  
 C. Krusemanstr. 43 Amsterdam-Z. I

**Flandra Ligo Esperantista.**

Postbus 342, Brussel.


Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.  
 U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberghe. P.C. 4161.35  
 Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

**Kongreso en Hilversum.**

- Se vi partoprenos en la beneluksa kongreso en Hilversum, faru jenon:
1. Pagu la kotizon (40 au 50 Fr.) al nia karavanestro, E. Cortvriendt. Ankaŭ se vi private faros la vojaĝon! La adreso: Diepestraat 44, Antwerpen, P.C. 4136.04.
  2. Plenigu la aligilon kaj sendu ĝin al f-ino Visser, Galileistraat, 42 en Hilversum kaj menciuj ke vi pagis la kotizon al Fl. L. E.
  3. Pri la pago de la aliaj aranĝoj kaj la loĝado, vi interrilatu kun la L.K.K. en Hilversum, ĉar ekzistas tri ebloj:
    - a. vi pagas jam nun en guldenoj (ekz. per pago en Nederlanda poŝtoŭcejo — P.C. de f-ino Visser, 3789.64)
    - b. vi promesas pagi je via alveno en Hilversum, sed tiam vi petu la permeson al la L.K.K.
    - c. vi pagas ĉion al nia karavanestro, laŭ la enmetita aligilo.

SPARU JAM NUN; la kostoj vere ne estas grandaj: + 500 Fr. Rimarku la malmultekostan loĝadon (2,5 g., 3,5 g., 4,5 g., 5 g.). Ĉe la sekretario vi povas ricevi aligilojn!

**L.E.E.N. — FL.L.E. AL HILVERSUM!**



La aligiloj alvenas kaj ĝenerale la samideanaro kontentige respondis nian unuan alvokon. Verdire ni ne atendis ion alian! Ĉiu vera esperantisto jalaŭpove kunlaboras por sukcesigi la kongreson kaj povastion fari per tuja aliĝo. Ĉu vi ankoraŭ memoras nian decembran devizon? „Antaŭ la fino de januaro la unua cento estu anoncinta sin!“. Car la manuskriptoj devas atingi la redaktoron sufiĉe frue, ni nun ne jam scias, ĉu la devizo estos realigata, sed la antaŭsignoj estas bonaj.

Al vi, karaj gelegantoj, nur du petoj, du facile plenumebloj petoj:

Anoncu vin tuj kaj faru tion ankoraŭ hodiaŭ! Kial prokrasti, se vi certe intencas partopreni la esperantistan komunumon, kiu dum tri tagoj regos en Radiourbo? Per prokrasto vi nur stagnigas la laboron de la L.K.K. kaj krome kaŭzas malprofiton al vi mem. Parodiante proverbon ni diru: „Kiu anoncos sin unue, dormos plej frue (kaj plej ĝue-red.)“ ĉar ju pli longe vi prokrastos vian aliĝon, des pli malproksime vi tranoktos, se entute ni tiuokaze povos havigi tranoktejon al vi! La L.K.K. disponas pri nur malmultaj senpagaj tranoktejoj, kiujn la L.K.K. rezervas speciale por tiuj, kiuj venas de malproksime kaj allokaze pro financaj kaŭzoj ne povus partopreni.

Bonvolu atenti, ke pro oficiala prezaltiĝo en la restoracioj ni estas devigataj plialtigi la lunĉprezon je 14-V per g. 0,25. Aliĝontoj bonvolu aldoni tiun sumeton al sia pago; tiuj kiuj jam pagis, bonvolu krompagi en la kongresejo.

Flandraj geamikoj, vi pagu la kotizon (antaŭ 1-III b. fr. 40,— poste b. fr. 50,—) al via karavanestro s-ro E. Cortvriendt, Diepestraat 44, Antwerpen, p.k. 4136.04 sed vian aliĝilon kun mendoj por la manĝoj k.t.p. vi bonvolu sendi rekte al f-ino S. Visser, Galileistraat 42, Hilversum, poŝtĝirkonto 378964.

**Hoekje van de Penningmeester. Fl. L. E.**



Dank aan alle getrouwen van Flandra Esperantisto die op mijn laatste oproep zo tairijk hun cotisatie hebben gestort. Dank aan onze steunende leden die van jaar tot jaar aangroeten, en ons toelaten trouwe abonneuten die momenteel in financiele moeilijkheden verkeren, ons bondsor gaan voorts te laten geworden. Solidariteit moet steeds een hoofddeugd blijven van ons Vlaamse Volk. Wat de achterblijvers betreft, stort onmiddellijk uw bijdrage op P.C.R. 232150, V.E.B., Brussel wilt U de kosten van inning niet moeten dragen.

De bijdragen zijn als volgt:

Leden (met F.E.)	75 fr.
Inwonenden (met de Esperantist)	25 fr.
Steunende leden: minstens	150 fr.
Vrienden (met de Esperantist)	20 fr.
Jongelieden, tot 18 jaar (met F.E. en La Juna Vivo)	50 fr.
Jonge leden van 18 tot 21 jaar (met F.E.)	50 fr.

Membroj — Subtenantoj 1951. (3-a listo)

S-ro Cortvriendt Em.	150 fr.
F-ino Cornelis B.	150 fr.
S-ino Roosen Cl.	150 fr.
F-ino De Cock P.	150 fr.
F-ino Top M. J.	150 fr.
S-ro Debrouwere Ger.	150 fr.

**SOMERAJ KURSOJ**

Por la ĉi jaraj someraj kursoj, organizotaj de L.E.E.N. kaj Fl.L.E. ni definitive luis la konferencojn de „Ned. Protestanten-Bond“ en Soesterberg de 27-VII ĝis 2-VIII, tiel ke tiuj, kiuj vizitos la Universalan Kongreson en München, povos ĉeesti la kursojn kaj poste gustatempe atingi München.

La konferencio havas lokon por proks. 100 personoj, sed eĉ se ne partoprenos tiom, la tuta ejo estos rezervita por ni; do ni tie troviĝos nur inter esperantistoj.

Soesterberg situas en belega regiono (arbaroj, erikejoj) en la mezo de Nederlando kaj estas facile atingebla (aŭtobushaltejo tuj apud la konferencio).

La kostoj por plena pensio, inkluzive de kurskotizo kaj kelkaj duontagaj ekakursoj, estas nur g. 36,-. Se oni deziras tranokti en dupersona ĉambro (estas nur kelkaj dupersonaj ĉambroj) oni devos krompagi g. 4,-.

Baldaŭ aperos detala prospekto, kiun volonte sendos al vi la administranto s-ro C.B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer.

Eksterlandanoj povos pagi per nederlanda mono en la kongresejo, akceptante la kongresdokumentojn.

Kial vi venos al Hilversum?

La „malnovuloj“ en la movado, ĉar ili laŭsperte konas la instigan influon de niaj kongresoj; la „novbakitaj esperantistoj“, ĉar ili jam tiom aŭdis pri la valoro de niaj kongresoj, ke je Pentekosto ili mem volas konstati ĝin.

Do... ek al Hilversum! Ni atendas vin! La devizo de la monato: „Fine de februaro minimume 200 aliĝoj!“

**Imago**

Iam studento demandis al B. Russell, kiu ĵus gajnis Nobel-premion, aŭtoro de multaj verkoj filozofiaj kaj sociologiaj, kio estas, laŭ li, imago. Li respondis:

„Ĝi estas io senpeza, speco de krea instinkto... Nu: imago estas la metafizika komplekso, kiu ekaptas ĉiun virinon, kiam ŝia edzo troviĝas, malfrue vespere, ekster la domo.“

**NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.**

PREMION akiris por VEB, post n-roj 97-98: s-ro Bertels, el Mechelen, kaj por LEEN: s-ro H. J. Hendriksen, el Bussum.

**SOLVOJ.**

N-ro 99. Eĉ kiu plej bone pafas, tamen iam maltrafas.

N-ro 100. *Horiz.* 1. fokus; kambi. 3. templ; raket. 4. pak; tra. 5. grat; muk; ar. 6. duŝ. 7. aj; kaŝ; fajr. 8. kiu; sol. 9. ignor; trakt. 11. tedeg; paliĝ. — *Vert.* 1. fotografist. 3. kampad; kned. 4. pat; kio. 5. sulk; daŭrig. 6. muŝ. 7. kortuŝ; stup. 8. ark; for. 9. moka; balail. 11. interfratiĝ.

**N-ro 101. ENIGMO.**

1. draŝi. 2. danki. 3. torfo. 4. mardo. 5. verŝi. 6. lukto. 7. liano. 8. talio. 9. tablo. 10. dorno. 11. tempo. 12. drako. 13. tasko. 14. nordo. 15. daŭro. 16. trovi. 17. perdi. 18. morti. 19. penso. 20. gurdo. 21. lango. 22. nacio. 23. turbo. 24. dikti. 25. drapo. 26. tanko. 27. dieto. 28. friti. 29. taksi. 30. tramo.

En ĉiu el la ĉi-supraj vortoj anstataŭigu unu literon kaj intermiksi la literojn por formi novajn vortojn, respondantajn al la sekvantaj klarigoj. La nove aldonitaj literoj, legataj en la donita ordo, formas Zamenhofan proverbon.

1. tre modere uzi. 2. prilabori pastecan substancon. 3. kesto. 4. refreŝiga ripozo. 5. fendiĝi. 6. blanka pulvoro. 7. metala bastoneto por firme kunigi. 8. plej bona parto el aro. 9. longa lignopeco. 10. ĉirkaŭa ekstrema parto. 11. apliko de forto sur iun korpon. 12. fadeno estiganta sonon. 13. ujo. ĝenerale ligna. 14. korpoparto. 15. fadeno. 16. zorgi infanon. 17. ekzerco. 18. skuetiĝi. 19. aro da objektoj kun komunaj ecoj. 20. medikamento. 21. profito. 22. ritma movado de membroj. 23. horizontale metita tabulo. 24. per delikataj ektuŝoj kaŭzi konvulsian ridon. 25. muzikilo. 26. kalkulo. 27. profesio. 28. atingi. 29. skrapante ebenigi grundon. 30. detruigo.

1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
12	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

**N-ro 102: KRUCVORTENIGMO.**

*Horizontale.* 2. oni uzis ĝin por surkovri vundojn (R); malsobra persono (R). 3. rajdanto sidas sur ĝi (R). 4. ĝi kovras plankon (R); bastoneto kun fibroj de lino, k.t.p., uzata ĉe fadenigo (R).

6. ne timanta komenci la plenumadon de gravaj taskoj (R). 7. prepozicio. 8. sentakta (R). 9. prepozicio; kaj ne. 10. malkonfesi. 11. senti fortan surprizon pro io stranga; pene supreniri sur altan lokon (R).

*Vertikale.* 1. havigi al si. 2. meti en ies manon (R). 3. kanajlo (R). 4. larĝaspirita (R). 5. tirante dispeciĝi (R). 6. igi senfina (R). 7. ĝi veturas sur la maro (R). 8. detruji. 9. vegetaĵo kun belaj floroj (R). 10. alpreni delikatan gradon de iu koloro (R). 11. solene festata datreveno (R); trinkaĵo (R). 12. persona pronomo; dombesto (R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z.; kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-II-'51.

**ANONCETOJ.**

S-ro José Laercio do Egito, strato Palma, Ed. S.A.E.L., 5 and. S 503, Recife, Pernambuco, Brazilo, deziras korespondi, prefere per il. pk.

S-ro L. Verstuyft, 38-jara, rue Vernand Séverin 46, Schaerbeek, Brusel, sorĉas 2 korespondantojn por interŝanĝi leterojn kaj il. pk. respektive en Esperanto kaj nederl. lingvo.

S-ro Hirojuki Sinkai, 19-jara studento en seminario, Uda-maĉi 1, Hukuoka-ŝi. Hukuoka-ken, Japanujo, deziras korespondi precipe pri pedagogio kaj socialaj problemoj.

**BIBLIOTEKO L.E.E.N. JARRAPORTO**

Nur tre malofte mi povis komenci mian raporton per ĝojiga komuniko. La antaŭan fojon mi estis treege pesimisma; ĉi foje mi ne povas esti pli fiera pri la uzado de la libroj el la biblioteko. En 1949 mi pruntedonis nur 127 librojn kaj ĉi tiun jaron 134, do preskaŭ same malmulte. Sed mi ne plu instigas al pli ofta libropruntado ĉar mi konvinkigis, ke tio ne utilos. Tamen oni povas fariĝi pli sperta esperantisto, nur per legado de bonstilaj verkoj. Via biblioteko enhavas sufiĉe da tiaj. Domaĝe ke oni ne pruntas ilin! En 1950 mi povis enskribi kelkajn novajn librojn. La jarkunveno de L.E.E.N. aprobis, ke mi uzu la saldon de 1949 nome g. 30,715, por aĉeti novajn verkojn. Aperis lastatempe nur malmultaj gravaj libroj kaj cetere ili estas tre multekostaj. Se la membroj pruntus ilin, mi ilin aĉetus, sed mi ne kuragaŝ supozition. Tial mi ĝis nun mendis nur du verkojn.

Financoj:

<i>Enspezoj:</i>	
Saldo 1949	g. 30,715
Pago de perdita libro	1,-
Donaco de s-ino S. L.	1,-
Kontribuo ĉefestraro	25,-
	g. 57,715
<i>Elspezoj:</i>	
Afranko	g. 18,84
Aĉetita libro	1,-
Punafranko	64,-
Papero kaj ŝnuro	1,35
Saldo 1950	35,885
	g. 57,715

la bibliotekisto E. A. Koot, Joh. de Meesterstr. 12, Utrecht.

La subskribintoj deklaras, ke la biblioteka administracio estas en bona ordo.

W. Baaten.  
Chr. F. W. Slijper.

**BIBLIOGRAFIO**

L. Vetter: *La 13-a mortis*, kriminalromano, el la germana de H. Borschert, Bamberg (Germ.) 1950, 191 p.

I. F. Najlvin, *Kiso de la reĝino*, el la rusa de D. Staritsky („Epoko“-libroj, vol X), eld. Esp. Publishing Cy, Rickmansworth (Angl.), 1950, 188 p.

F. Szilagyi: *Inter sudo kaj nordo* (originale verkita), eld. Eldona Societo Esperanto, Stockholm (Sved.), 1950, 185 p.

A. Bøgh-Høgstæd: *Misteroj de l' vivo* (noveloj), el la dana de C. Graversen, eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj (Danl.), 1950, 100 p. Recenzo sekvos.

**PROPAGANDA SERVO L.E.E.N. JARRAPORTO**

Al ĉiuj internaciaj kongresoj okazintaj en Amsterdam, mi sendis preton pri senpaga anonco en la kongreslibro sed vane. „Sveda Esp.-Asocio“, „Ĉeĥa Esp.-Asocio“, „Wereldburger“, „Heroldo“ kaj privatale reproduktis unu el niaj propagandaj klišoj. Al „Parool“ kaj „Vrije Volk“ mi sendis korekton rilate iliajn neĝustajn kritikojn. „Zuidercourant“ enpresigis „interkonatigan kurson“ kiu havis konsiderindan sukceson. „Libelle“ rifuzis enpresigi artikolon pri Esp. La sekre. de la dep. „Waterstaat“ akceptis min por priparoli, kiel la dep. povos helpi en la apliko de Esp. Laŭ peto de tiu dep. kelkaj ŝtataj entreprenoj nun esploras la eblojn. Al la de la dep. O.K.W. starigita konkurso komitato por filmo mi sendis manuskripton por ke la diversaj komitatanoj eksciu iom pri nia laboro. Al U.N.E.S.C.O.-centro mi donis informojn pri nia agado. Al la Komerca ĉambro mi petis esplori, kiom Esp. jam estas disvastigita inter la servistaro. Ĝi rekomendis al mi, kontakti kun „Ned. Mij voor Nijverheid en Handel“, kion mi faris. La reklamilojn de K.L.M. kaj S.A.S. mi sendis al Pan American Airways kun la peto agi simile. La peto estas transdonita al la koncerna instanco. Dank al financa subteno de sekcio Amsterdam mi iom pli grandskale povis tiri la atenton de la granda publiko. De 23 personoj mi ricevis informojn. Tre ofte mi informis telefone alvokantaj personojn. Neniu sekcio raportis dum la tuta jaro pri la farita laboro, do mi povis raportoj nur pri propraj agoj. Entute la elspezoj sumiĝas g. 25, 98.

H. BAKKER.

**Plaatselijk Nieuws.**

*V.E.B. Afdeling Antwerpen:* Ons programma, dat afgewerkt werd, luidde als volgt: 8/1: diversen; verslag over EKI-avond; 15/1: bestuursverkiezing, verslag over 1950; 22/1: zangavond; 29/1: spreekbeurt. Ons feestje waarvan de datum vastgesteld was op 20 Januari 1951, werd uitgesteld tot nader bericht.

*V.E.B. Afdeling Brugge:* Ons Kerstfeestje in intieme kring was een succes en duurde tot de morgenstond. De leden schenen gedurende Januari de weerbots te gevoelen, want buiten de gewone dagorde werd niets speciaals gepresteerd. Voor Februari volgend programma: 1/2/51: aanleren van liederen; 8/2/51: met de leden „Tra la labirinto de la gramatiko“; 15/2/51 enignosolvado ĉiuspeca kaj cerbogramnastiko; 22/2/51: parolado de nia vic-prezidanto pri la financa sistemo en Belgio.

*V.E.B. Afdeling Gent:* De twee hoogtepunten der maand December waren enerzijds de lezing gehouden door mej. Tussveld ('s Gravenhage) en het Zamenhoffsfeest. De lezing was zeer levendig en buitengewoon interessant. In samenwerking met *Amika Rondo* slaagden wij erin voor ons Zamenhoffsfeest een puik programma samen te stellen: redevoeringen, voordragen, liederen, muziek wisselden elkaar af; er werd zelfs een Egyptische mummie uit het eeuwenoude graf gehaald om ons de wetenschap van de andere wereld mede te delen. Een verrassingstombola was het slot van deze aangename en gezellige avond. Alle Gentse Esperantisten worden uitgenodigd regelmatig onze vergaderingen bij te wonen.

*V.E.B. Afdeling Mechelen:* Ons programma voor Februari is als volgt: 7/2: Enigmoj; 14/2: Gramatiko; 21/2: Prelego de s-ro R. van Humbeek; 28/2: Prelego de d-ro Van Ginder-taelen.

**Groningen:**

- 1-II S-ino W. A. Wessels rakontas pri Texel kaj Terschelling.
- 8-II S-ro Frieso Moolenaar rakontas pri Sud-Afriko.
- 15-II S-ro H. Albers prelegas pri Aŭstrujo.
- 22-II F-ino E. Hovinga rakontas pri la historio de „Pepergasthuis“.
- 1-III Prelego de f-ino J. E. Prins.

**Hilversum:**

- 8-II S-ro A. Put prelegas pri literaturo.
- 15-II La kongreskomisionoj raportas!
- 22-II S-ino R. v. Veen rakontas pri siaj travivaĵoj.
- 1-III F-ino M. Hootsen prizorgas la virinan rubrikon. Ea ĉiuj kunvenoj (escepte je 15-II) unuhora studado.

**POR KORESPONDEMULOJ Internacia Koresponda Servo U.E.A.**

Por kontentigi la dezirojn de multaj korespondemaj gesamideanoj, kiuj ĝis nun ofte misuzis la valoran tempon de la delegitoj, petante ilin serĉi korespondantojn, Universala Esperanto-Asocio starigis Internacian Korespondan Servon, kies tasko estas peradi korespondopetojn.

La registrado estas senpaga, sed ĉiu korespondemulo sendu al la peranto de I.K.S., s-ro R. Melo, Meylieu par Montrond les Bains, (Loire) Francujo, unu membromarkon (servokuponon) por pruvi sian membrecon kaj sciigu precize kaj koncize al li siajn nomon, adreson, sekson, aĝon, profesion kaj koresponddezirojn. Por kompensi la elspezojn de la peranto ĉiu, kiu mem deziras ricevi korespondadresojn, aldonu 2 int. poŝtajn respondkuponojn ĝuste stampitajn. Detalojn pri la nova servo oni trovos sur paĝo 170 de „Esperanto“ (dec. 1950).

**ULTRA MONTES N.V.**

De Keyserlei 14 Antwerpen Tel. 33.03.50 32.76.15  
Arenbergstr. 17 Brusel Tel. 12.55.02

**Reizen naar alle bestemmingen**

Spoor-, Vliegtuig- en Scheepsticketten tegen officiële prijzen onmiddellijk verkrijgbaar

**Korespondas en Esperanto**

**DEFINIOJ PRI LA MALSAŬOJ**

La korpo konsistas el ĉeloj, kiuj estas kunorditaj en histojn. Organo kiu, sur anatomia kaj psikologia tereno, formas unuon, konsistas el diversaj histoj. Diversaj organoj povas kune formi sistemon. Ĉiu histo havas propran funkcion, tial ankaŭ ĉiu organo, ekz.: la stomako helpas ĉe la digestado la reno ĉe la urinado. Ĉiuj tiuj funkciadoj tamen estas reciproke tiel ligitaj, ke ili kunlaboras al la granda tasko, kiun oni nomas „vivo“.

La harmonia kunlaboro de ĉiuj tiuj vivfunkciadoj, kiel okazas en normalaj kondiĉoj, estas la karakterizo de la sano aŭ ĉiu organo. Kiam unu aŭ pluraj histoj, organoj aŭ sistemoj malordigas en sia evoluo, konstruo aŭ laborado kaj kiam tiu interrompo havas certan forton kaj daŭron, oni parolas pri *malsano*. La malsanoj oni diferencigas de certaj *ĝenoj*, kiam la interrompoj estas malfortaj aŭ mallongdaŭraj, ekz. ĉe sinkopo, sekve de timo aŭ doloro aŭ ĉe pasa kapdoloro aŭ lacego. Tamen tiu ĝeno povas esti simptomo aŭ komenciĝo de malsano.

Malsano montriĝas per malsanaperoj aŭ simptomoj.

En la kuracado oni distingas inter:

I. *Ĝeneralaj malsanaperoj*, komunaj al multaj malsanoj (ekz. febro, pulsrapidego).

II. *Specialaj malsan-simptomoj*, propraj al difinitaj malsanoj (ekz. tuso, mukokraĉo, diareo).

Malsanoj povas iĝi akutaj aŭ kronikaj. La unuaj evoluas en mallonga tempodaŭro kaj ĝenerale fortaj simptomoj akompanas ilin; la aliaj evoluas en pli longa tempo kaj kutime la simptomoj ne estas tiel fortaj.

Laŭ alia divido oni diferencigas:

I. *Subjektivaj malsan-simptomoj*: tiuj, kiujn nur la paciento kapablas senti (lacego, doloro, perdo de apetito).

II. *Objektivaj malsan-simptomoj*: tiuj, kiujn ĉiuj kapablas konstati (malgrasigo, febro, paleco).

En la kuracado la objektivaj simptomoj havas pli da valoro ol la subjektivaj, ĉar koncerne la subjektivajn oni devas kalkuli kun ebla troigo, ŝajnigo. Kelkaj subjektivaj simptomoj tamen povas esti interpretataj kiel objektivaj simptomoj, ekz. doloro povas esti tiel forta ke ĝi povas kaŭzi pulsrapidegon kaj ŝvitadon.

**Kaŭzoj de malsanoj.**

Pluraj faktoroj povas esti la kaŭzo de malsano, rekte aŭ malekte. Oni grupigas ilin laŭ internaj aŭ eksteraj kaŭzoj.

*Eksteraj* estas kaŭzoj kiuj de la ekstero kaptas la korpon kaj kutime kaj plej ofte rekte prezentas sin kiel malsankalzon.

I. *Mekanikaj*: ĉiuj fortogaj aperoj, kiuj kaŭzas malsanon aŭ atakon (ekz. frapo, falo, vundo). Mekanikajn kaŭzojn de malsano aŭ ĝeno en la korpo oni nomas „traŭmo“. En pli vasta senco oni nomas ankaŭ la vundon „traŭmo“. Kaŭzo kaj sekvo do havas la saman nomon.

2. *Fizikaj*: varmegfrapo (ne konfuzota kun sunfrapo), kaŭzata de la varm. *Malvarmo* povas kaŭzi frostadon de unu aŭ alia korpoparto aŭ kunhelpi al infekta malsano (ekz. pulm-inflamo, pleŭrito). *Malsano* povas kaŭzi reŭmatismen, astmon ktp. Ankaŭ la klimato ludas gravan rolon koncerne la homan korpon. Forta lumo kaŭzas elektrolizon. *Aerpremo* — tro alta kiel tro malalta — kapablas kaŭzi diversajn interrompojn.

3. *Hemiaj*: a. la venenaj materioj: solidaj, fluidaj kaj gasaj. b. la vegetaj venenoj (ekz. venenaj fungoj). La plej multaj medicinaj plantoj enhavas elementojn, kiuj povas esti same venenaj kiel kuracaj laŭ la uzata dozo (grajnkapo de la papavo — opio —; folioj de digitaloj — digitalis; koka-folioj — kokaino — aŭ granoj — kafeino —).

4. *Biologiaj aŭ vivantaj*: a. unuĉelaj estaĵoj (laŭ la grandeco jeme: virusoj, bakterioj, kokoj, baciloj, spiriloj, spiroĥetoj, protozooj). b. plurĉelaj estaĵoj: vegetaj (simajoj); bestaj (parazitoj; vermoj, insektoj); arahnoidoj (skabio); plej altrangaj bestospecoj. Simajoj, parazitoj kaj arahnoidoj kaŭzas malsanojn aŭ ĝenojn per sia ĉeesto en aŭ sur la korpo; insektoj kaj plej altrangaj bestospecoj per la transdono de bakterioj, kiuj alportas venenajn en la korpon.

TEDDY

Veranto, uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 348 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging L.E.E.N., Stationskade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 51, Utrecht (Ned.).